

V - 19479 / 47

(1978)

Bulgara **ESPERANTISTO**





Ekspozicio dediĉe al la Granda Oktobro en Polski Trâmbeš (vd. p.6.)



Nova esperantista geedza paro en Sofio: Violeta Simova — instruistino, kaj Dimitro Papazov — prezidanto de Bulgara E-Junularo. La geedziĝfeston, kiu okazis en decembro 1977, partoprenis multaj sofiaj esperantistoj.

Firman sanon kaj multan feliĉon al la novaj geedzoj!



E-stoi el Soĉi kaj Krasnodar (USSR) organizis dutagan aŭtobusan ekskurson al la montara lago Rica kaj multkilometra groto apud Novi Afon (Kartvelio)

ENHAVO

Nikola Aleksiev. Plenforte al la 63-a Universala Kongreso!	1
* * * Informoj pri la 63-a UK	2
* * * Informo pri la 34-a Kongreso de TEJO	3
Haim Levi. Pinoĉet—faŝismo!	4
Dimitro Motuŝev. Intervjuo kun Konstantin Raev	4
* * * Plenkunsidoj de distriktaj estraroj	5
Ĥristo Manolov. Ekspozicio „La mondo sub la signo de Oktobro 17“	6
Veselina Kurteva. E-aktivecoj en Plovdiv dediĉe al Oktobro	6
K. Vălev. En Plevnen — urbo de la bulgara-rusa batalamikeco	7
Flori Nikolov. Solena literatura vespero	7
Lazar Andreev. La esperantistoj de „Fajrero“ ekskursis	8
* * * Manifestaĵoj de amikeco inter bulgaraj kaj rumanaj esperantistoj	8
Jordan Kalinov. Profundaj radikoj de la amikeco inter bulgaraj kaj rumanaj esperantistoj	9
Cvjatko Todorov. Interesa rakonto pri amika lando	10
Dmitrij Perevalov. Oktobroresta renkontiĝo en Ivanovo	10
Viktor Zaĥarov. Esperanto-renkontiĝo en Ĉeljabinsk	10
Nikola Nikolov. Verdan vojlumon al la Esperanto-turismo!	11
Vojtech Trojan. Letero el Ĉeĥoslovakio	12
P. K. Javorov. Al unu pesimisto. Traduko de Asen Grigorov	13
Pavleta brava kaj Pavleta-edzino juna. Trad. A. Grigorov	14
Nevena Nedelĉeva. Invito	14
Todorka Bogdanova. Mia avo lernas rusan lingvon	15
* * * Tra la gazetaro. Deziras korespondi	III-IV

Sur la kovrilpaĝo:

Amika renkontiĝo de bulgaraj kaj rumanaj esperantistoj en Bukureŝto (vd. paĝon 8)

Redakta komitato:

Kunĉo VĂLEV (ĉefredaktoro), Nevena ALEKSIEVA, Marin BĂCEV, Ljuba BOJAĜIEVA, Ĥristo GOROV, Asen GRIGOROV, Dimitro DENĈEV, Dimitro HAĜIEV, Krăstju KARUCIN, Haim LEVI, Vasja PETROVA.

Korektis: Rajna Konstantinova

**PLENFORTE AL LA 63-A UNIVERSALA KONGRESO!**

La ĉefa tasko de la bulgara esperantistaro dum la antaŭstarantaj monatoj estas la sukcesa realigo de ĉiuj aranĝoj de la 63-a UK de Esperanto.

La plenkunsido de la Centra Estraro de BEA en la pasinta jaro skizis ĉiujn sindevigojn lige kun tiu ĉefa tasko. Oni povas diri, ke jam estas farita serioza paŝo en tiu direkto. Ekz. la nombro de bulgaraj kongresanoj superis senteble la orientigan ciferon: pli ol 500 anstataŭ 400 personoj. Tiu fakto elokvente parolas pri la aktiveco de nialanda esperantistaro, kiu rilatas respondece al la okazigo de la Varna kongreso.

Tiu amasa subteno donas plian impulson al la laboro de la Lokaj Kongresa Komitato. Malgraŭ iuj objektivaj malfacilaĵoj survoje al la fina celo, la preparlaboroj antaŭeniras. LKK kompreneblas, ke la organizado de amasa internacia kongreso dum la plej streĉa turisma sezono estas laŭ si mem tre komplika afero. La vojo tamen estas elektita kaj oni sekvas ĝin ĝis la fino. La 63-a devas funkcii kaj plenumi sian programon tute normale.

Kompreneble, por tio kontribuos ĉiuj kongresanoj el la tuta Esperantio. Dum la kongresa semajno en Varno ni esperas je aktiva kunlaborado de ĉiuj tavoloj de la monda esperantistaro en la nomo de novaj sukcesoj de la E-movado. La 63-a okazas en la komencigo mem de la lasta jardeko de la proksimiĝonta centjara jubileo de la rimarkinda kreaĵo de d-ro L. L. Zamenhof. La Varna kongreso devas doni starton al riĉa sukcesplena agado de la esperantistaro dum la periodo ĝis la festa jubileo!

En tiu ĉi nobla agado ĉe la konkretaj kondiĉoj de la preparlaboroj por la 63-a plej peza ŝarĝo falos sub la ŝultrojn de la bulgara esperantistaro. Ni devas sinofere streĉi niajn fortojn por garantii la plenumon de ĉiu programero de la kongreso. Ni devas montri nin bonaj dommastroj kaj ĉiuflinke faciligi la restadon, la laboron kaj la ripozon de niaj kolegoj el eksterlando. La esperantista solidareco devas manifestiĝi laŭ plej modela maniero. Por multaj el niaj gastoj, kiuj unufoje vizitos Bulgarion, multo estos nova kaj nekonata. La cirila alfabeto, la bulgara maniero jesi aŭ nei per kapsigno foje erarigos la fremdulojn. Ni devas klarigi al ili niajn apartaĵojn kaj kutimojn. Ni devas krome sisteme deĵoradi, por ke la kongresa ordo ne estu rompita. Ni devas montri nin akurataj ĉe aranĝo de kunvenoj, ekskursoj, kulturaj festoj ktp. Ni tre serioze devas kontribui por la kreo de bona laboretoso dum la tuta kongresa semajno. Neniu kongresano devas forlasi nian landon malkontenta, sed mile — flegi bonajn amikajn sentojn al la dommastroj, al nia tuta popolo kaj patrolando.

Sed por atingi tion ni devas laboregi ĉiutage kaj verve. En tiu laboro helpas grave nin ankaŭ la bona praktika uzado de Esperanto, ĉar unusola lingvo por interkompreniĝo kun niaj gastoj estos ja la Internacia Lingvo! La 63-a prezentas al ni bonegan eblecon levi niajn linguokapablojn je pli alta

nivelo, je la necesa nivelo. Ni devas krei novajn amikajn ligojn, gajni literamikojn por nia estonta korespondlaboro. Tial en la kursoj por perfektigo oni partoprenu ĉmase!

Je la nomo de LKK mi apelacias al ĉiu bulgara esperantisto: organizite kaj celkonscie helpu la realigon de la konkretaj taskoj por sukcesa laboro de la 63-a! De tio dependas la prestiĝo de nialanda esperantista movado!

Ek al laboro, energia kaj fruktdona, por la bono de la internacia movado de la esperantistaro!

Al brila 63-a UK en Varno!

*Nikola ALEKSIEV
prezidanto de LKK*



63-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Varno (Bulgario) 29. VII — 5.VIII. 1978

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Adreso de la Loka Kongresa Komitato: Bul. Ĥr. Botev 97, 1303 Sofio, Bulgario

Alta protektanto:

Petăr Tanĉev — unua vicprezidanto de la Ŝtata Soveto de Bulgario

HONORA KOMITATO

akademiano Georgi Karaslavov — verkisto
akademiano Angel Balevski — prezidanto de la Bulgara Akademio de Sciencoj.

Marij Ivanov — unua vicministaro pri eksterlandaj aferoj

akademiano Kiril Bratanov — prezidanto de la Asocio de Sciencaj Laboristoj

Atanas Dimitrov — prezidanto de la Ŝtata Komitato por Turismo

akademiano Pantalej Zarev — prezidanto de la Unuiĝo de Bulgaraj Verkistoj

akademiano Petar Dinekov

Stanoj Jonev — prezidanto de la Urba Soveto de Varno

prof. Vasil Peevski — membro de la Honora Patrona Komitato de UEA

prof. Georgi Dimitrov — rektoro de la Supera Instituto de Popola Mastrumo en Varno

patriarko Maksim — de la Bulgara Ortodoksa Eklezio

Ĥristo Radevski — poeto kaj parlamentano

ESPERANTOLOGIA KONFERENCO

La Centro por Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) organizos en la kadro de la 63-a UK Internacian Konferencon pri Esperantologio.

Estas projektataj prelegoj pri la valoro de Esperanto por la moderna lingvoscienco; la nuna stato de la scienca analizo de Esperanto; la direkto, laŭ kiu la internacia lingvo evoluas; Esperantaj terminaroj ktp.

Personoj, pretaj kontribui al la Konferenco, kontaktu laŭeble plej rapide d-ron Detlev Blanke, estraron de CED, ĉe Wollnerstr. 13/14, DDR — 1058 Berlin, Germana DR.

FINFINE INFANKONGRESETO!

Post dujara prokrasto, en Varno okazos la 16-a Internacia Infana Kongreseto por esperantistoj 6- ĝis 13-jaraj. La kongreseto ĵo estos moderna elementa lernejo, piede atingebla de la Palaco de Sporto kaj Kulturo (la ĉefa ejo de UK). Aliĝiloj estas haveblaj ĉe la konstanta adreso de UK kaj LKK.

Esplorata estas la ebleco de infanvartejo por pli junaj infanoj, kun tre malalta kotizo aŭ tute sen kotizo, sed kun labordivido inter la koncernaj gepatroj. Kiuj interesiĝas pri tio, bonvolu skribi al la konstanta adreso de UK.



La 34-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos en unu el la plej pitoreskaj kaj fascinaj urboj de la tuta Balkana Duoninsulo — Veliko Târnovo. Origininte el mezepoka fortikaĵo, ĉefurbo de la Dua Bulgara Stato (1186—1396), V. Târnovo ne estas nur historio. Ĝi estas ankaŭ bela moderna urbo, kiu ĉiujare altiras milojn da turistoj el la tuta mondo.

La junaj e-stoj kongresos en la aŭlo kaj aŭditorioj de la universitato „Kiril i Metodi“. La programo antaŭvidas ankaŭ unutagan ekskurson al vidindaj lokoj en Norda Bulgario.

Tuj post la Junulara Kongreso okazos postkongreso en Varno dum la 63-a UK. Post tio la dezirantoj povos partopreni la 4-an Internacian Arkeologian Laborbriga-

don (5—28 de aŭgusto) aŭ resti ripoze ĉe Nigra Maro.

Bulgaraj kaj rumanaĵ e-stoj petu aliĝilo'n kaj pliajn informojn je adreso: *Bulgario, 1000 Sofio, p. k. 587, Loka Kongresa Komitato*. E-stoj el Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario kaj Pollando turnu sin al siaj landaj E-asocioj, kiuj estas kongresperantoj. Sovetaj e-stoj turnu sin al E-komisiono ĉe SSOD. Partoprenantoj el aliaj landoj petu aliĝilojn de LKK aŭ de TEJO (*Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando*), sed kotizo'n en guldenoj sendu nur al: *Bank Mees & Hope, NV, Coolsingel 93, Rotterdam-3001, konto 25.52.89.804 — por TEJO-Kongreso*, aŭ per poŝtekkonto: *Nederlando 378964, por TEJO-Kongreso*.

**La 12 de februaro —
internacia tago de solidareco
kun la popolo de Ĉilio**

PINOĈET—FAŜISMO!

Forpasis pli ol kvar jaroj ekde la tiel nomata „ĉilia operacio“, planita kaj efektivigita de la usonaj specialaj esplorservoj kaj la monopoloj de tiu lando. Ili deziris nuligi la venkon de la ĉilia popolo, esprimitan en la Bloko de Popola Unueco sub la gvido de Salvador Aljende, likvidi la liberon kaj la rajtojn de la laboruloj.

La faŝista puĉo je la 11 de septembro 1973 donis la regpotencon al unu el la plej kruelaj diktatoroj de nia nuntempo — generalo Pinoĉet. Li estis la gvidanto de la operacio, kiu likvidis la leĝan potencon de la Bloko de Popola Unueco. La nomo kaj la faroj de Pinoĉet estiĝis sinonimo de neleĝeco, de sanga teroro super miloj da homoj. Mortigitaj estis miloj da progresemaj homoj, la sorto de multaj aliaj estas nekonata. La faŝista hunto de Pinoĉet donis fortajn batojn al la demokratiaj fortoj en la lando, redonis al la usonaj monopoloj ĉiujn entreprenojn, kiujn la registaro de la Popola Unueco naciigis. En la

tuta operacio klare manifestiĝis la furioza antikomunismo de Pinoĉet kaj liaj imperiismaj mastroj. Ankoraŭfoje la faŝismo de Pinoĉet montris sian veran esencon — ĝi ne nur ĉesigis la progreseman evoluon de la lando, sed ankaŭ metis ĝin en pezan ekonomian krizon kaj la homojn de la laboro — en la kondiĉojn de terura senlaboreco kaj forta inflacio.

Je la 12-a de februaro ĉiuj progresemaj homoj en la mondo direktos siajn pensojn al la suferanta popolo de Ĉilio kaj esprimos sian unuecon kun ĝi, kun ĝia batalo por libero kaj socia progreso. La esperantistoj de Bulgario kaj el la tuta mondo, kiuj profunde malamas la faŝismon, kolere kondamnas la rabistan huntan de Pinoĉet kaj esprimas en tiu ĉi tago sian nerompeblan solidarecon kun la heroaj batalantoj por libero kaj homaj rajtoj en Ĉilio. La esperantistoj firme kredas, ke la tago de liberiĝo de la ĉilia popolo ne estas malproksima!

Haim LEVI

kun KONSTANTIN RAEV, ĝen. direktoro de la Oficejo de Turismo «Pirin»

Demando. K-do Raev, la bulgaraj esperantistoj interesigas pri la agado de la turisma Oficejo „PIRIN“. Estu afabla priskribi koncize tiun agadon.

Respondo. La Oficejo de Turismo estas ekonomia filio de Bulgara Turista Asocio. Ĝi portas la nomon de la belega Pirin-montaro — unu el la plej ŝatataj objektoj de la bulgaraj kaj fremdlandaj turistoj. La oficejo estas fondita en 1964 j. kaj ĝis nun priservis kelkcentmilojn da turistoj. Nia agado, figure dirite, trafluas tri pacajn kampojn. La unuaj du estas — aranĝi ekskursojn por bulgaraj civitanoj enlande kaj eksterlande, kaj la tria — organizi la restadon de fremdlandaj turistoj en nia lando (feriadon ĉe Nigra Maro aŭ en montaro, rondvojaĝajn itinerojn kun konigaj celoj, ekskursojn tra montaroj ka.).

Mi opinias, ke por vi prezentos intereson kelkaj plej ĝeneraligitaj donitaĵoj: dum naŭ monatoj de 1977 j. la Oficejo „Pirin“ organizis por bulgaraj civitanoj 301 ekskursojn en la lando kun 12 100 partoprenintoj kaj 119 ekskursojn al eksterlando kun 3862 partoprenintoj. En la Internacia Turismo ni priservis 17 403 personojn el 20 landoj. Tiuj ĉi rezultoj estas konsiderinde pli altaj kompare kun la sama periodo de la pasinta jaro.

Mi devas rimarkigi, ke ni korespondas kun multaj turismaj firmoj kaj kun 21 el ili ni havas solidajn rilatojn. Por la kuranta jaro ni proponis al la turisma merkato 26 itinerojn, por la venonta — 7 pliajn. Kelkaj el ili estas ligitaj kun 7 ĝis 10-tagaj ekskursoj en la montaroj Pirin, Rila kaj laŭ la montokresto de Balkano.

Oni devas scii, ke nia materiala bazo, ĉirkaŭ 10 000 litoj, krom en la marborda regiono de Nigra Maro, troviĝas precipe en belegaj montaraj lokoj. Ni povas menci iujn turistajn kaj montajn domojn: „Dom na Peŝternjaka“ (Domo de Kavernulo) en urbo Ĉepelare, „Begovica“ kaj „Bänderica“ en Pirin-montaro, „Semkovo“ en Rila-montaro, la domo apud Trjavna, tiu en Veliko Tŕrnovo ka. En ili ekzistas ĉiuj bonaj kondiĉoj por agrabla feriado en montaro kaj urbo. Do ni estas en stato bone respondi al riĉa gamo de intereso de fremdlandaj turistoj — organizitaj aŭ individuaj.

Aparte mi deziras diri ion pri nia laboro kun la individuaj turistoj, ĉar mi scias, ke la esperantistoj prefere vojaĝas individue aŭ en tute malgrandaj grupetoj. Dum la nuna jaro ni sukcesis priservi ĉirkaŭ 1000 individuajn turistojn el FRG, Francio, Pollando, Hungario, Belgio, Anglio, Italio. Post ilia



rekta demando aŭ pere de iu turista organizaĵo aŭ firma ni klopodas aranĝi ilian restadon kaj rezervi litojn por la dezirataj objektoj kaj datoj. En plimulto de la okazoj ni certigas ankaŭ la nutradon, do plenan pensionon. La anticipe farita de ni organiza laboro ĉiam kontribuis, por ke la restado de la turisto pasu sen maltrankvilaĵoj. Pro la varieco de sia bazo la Oficejo „Pirin“ havas eblecon kontentigi plej diversajn gustojn kaj preferojn de rondvojaĝaj konigaj grupoj, certigi feriadon ĉe la marbordo, veturadon sur Danubo ka., inkluzive praktikadon de diversaj formoj de amasa turismo — piedira tra unu aŭ pluraj montoj, alpismo, hobiturismo, bankuracado ka.

Koncerne la perspektivojn de Oficejo „Pirin“ mi povas precizigi, ke ili estas klaraj kaj optimismaj — unuflanke, la senĉesa plialtiĝo de la vivnivelo de nia popolo ebligas al la homoj ŝpari pli da monrimedoj el sia persona buĝeto por ekskursoj en- kaj alilande. Aliflanke, la proceso de malstreĉiĝo kaj la spirito de Helsinki pacigas la internaciajn rilatojn, kaj tio estas solida garantio por plimultiĝo de la vojaĝoj ekster la landlimoj kaj por la disvolviĝo de la internacia turismo. Niaflanke ni direktas niajn fortojn al priservado de ankoraŭ pli da turistoj el proksimaj kaj malproksimaj landoj, certigante al ili la deziratajn kon-



diĉojn por feriado kaj turismo laŭ novaj kaj belegaj itineroj kaj voĵetoj.

Demando. Por ni estas interese ekscii, kiamaniere oni venis al la iniciato pri la Nigramara Esperanto-Tendaro (NET) en la ripozejo „Kamĉija“?

Respondo. Por esti pli konkreta, mi devas rimarkigi, ke por tio kontribuis la konstantaj kontaktoj inter nia oficejo kaj la Komisiono de Turismo ĉe la Bulgara Esperantista Asocio. Ni kune precizigis respondojn al la demandoj de iuj esperantistoj-turistoj. Post la pridiskutoj, kiujn ni faris pri la uzado de Esperanto en la turismo, nia oficejo venis al konkludo, ke en la kadro de la tiel nomata „hobiturismo“ meritas, ke ni direktu nian atenton ankaŭ al unu nova klientaro, kia reliefigas la esperantistoj. Ni decidis ekpaŝi al konkretaj agoj kaj diskonigis la specialigitan aranĝon Nigramara Esperanto-Tendaro (NET) en la ĉarma ripozejo „Kamĉija“. Sed pro manko de sperto ni renkontis iujn specifajn malfacilaĵojn, tial la iniciato ne povis efektiviĝi en la pasinta jaro. Ni tamen estas certaj, ke la sukceso venos en la nuna 1978 j. Tiu certeco venas el la fakto, ke NET estas antaŭvidita kiel postkongresa aranĝo de UEA. Ni jam havis la unuajn intertraktojn kaj prezentis ankaŭ nian oferton. Ĉe manifestita konstanta intereso fare de la esperantistoj NET povas resti konstanta aranĝo, organizata por ili ankaŭ en la sekvaj jaroj. La ripozejo „Kamĉija“ restos en la centro de la atento, ĉar ĝi plaĉos al ĉiuj partoprenantoj. Tiurilate favore kombiniĝas serio da faktoroj: trankvileco, pura aero, agrabla varma mara akvo, konvenaj establejoj por amuzoj, fiŝkaptado, proksimeco de la rezervejo „Longoza“ ka. Sekve, ĉiu turisto en la kadroj de la komuna programo povas kontentigi ankaŭ siajn personajn preferojn. Por ni, kiel organizantoj, restos la agrabla sindevigo kreadi kondiĉojn por ĉiu gasto plenvalore ripozi en amika espe-

rantista atmosfero. Tiu, kiu unufoje venis al ni, devas havi la deziron denove kaj denove reveni.

Demando. Surbaze de la sperto, kiun vi havas ĝis nun, ĉu vi opinias, ke Esperanto povas esti uzata ankaŭ ĉe organizado de aliaj aranĝoj?

Respondo. Nia sperto pri la uzado de Esperanto estas tute malgranda. Ni ja estas nur en la komenco. Eble ĝi povas esti uzata ankaŭ ĉe aliaj aranĝoj. Ĉar same tiel inter la esperantistoj certe troviĝas naturŝatantoj, kiuj deziras ferii turisme en montaro. Ĉe manifestita intereso de esperantistoj, grupe aŭ individue, ni povas proponi kaj organizi por ili konvenajn ekskursojn al montaroj Rila, Pirin, Rodopi kaj tra la tuta teritorio de Bulgario, aŭ proponi kombinitajn itinerojn kun la najbaraj al ni landoj.

Eble por ni kaj por la Komisiono de Turismo meritas atenton iuj el la iniciatoj de la Bulgara Turista Asocio aŭ apartaj turistaj societoj en la lando, kiel: „Laŭ la paŝoj de la ribeltaĉmento de Botev“ (de rivero Danubo ĝis la montopinto Milin Kamak en la Balkano), „Laŭ la batalvojo de Anton-ivanovci“ (en Rodopimontaro), „La internaciaj konkuradoj pri orientiĝoj“ (proksime de urbo Velingrad), „La internaciaj konkuradoj pri alpismo“ (en la regiono de monto-supro Maljovica en Rila-montaro) kma. Mi ne havas intencon menciigi ĉiujn turismajn iniciatojn, sed mi volas emfazi, ke ankaŭ aliaj aranĝoj povas esti afiŝataj inter la esperantistoj kaj iliaj amikoj. Kaj ni, kiel ekonomia organizo, devas havigi al la alvenintoj tiujn priservojn, kiujn ili postulas de ni.

Fine, kiel bondeziron, mi volas diri, ke en ĉiuj okazoj oni devas serĉi konkretajn vojojn kaj konvenajn rimedojn por utiligado de Esperanto en la turistaj iniciatoj.

Interjuinto : Dimitro Motuŝev

ORGANIZA VIVO

PLENKUNSIDOJ DE DISTRIKTAJ ESTRAROJ

Simoljan. La 20-an de novembro en la Internacia E-Kursejo en Pisanica okazis plenkunsido de la DE de BEA. Ĝin partoprenis ankaŭ k-doĵ Hr. Gorov, N. Aleksiev kaj A. Todorov el la Buroo de la Centra Estraro de BEA.

Unua punkto de la tagordo estis la distrikta preparlaboroj por digna renkonto de la 63-a UK en Varno. Raporton faris la prezidanto de DE Jordan Jordanov. Estis elektitaj 42 aktivuloj, kiuj vizitos Varnon kaj partoprenos la laboron de la kongreso. Por aliĝo al la kongreso de TEJO en V. Târ-

novo estis elektitaj 10 aktivuloj, kaj por la Infana Kongreseto en Varno — 2 lernantoj.

La plenkunsido aprobis la proponitajn de la sekretario de DE Stefan Pavlov kontrolciferojn por varbado de abonantoj por „Bulgara Esperantisto“ kaj „Paco“. Entute en la distrikto oni varbos 600 abonantojn de „BE“ kaj 60 por „Paco“. Krome oni organizos E-kursojn por komencantoj kaj progresintoj kun partopreno de 800 personoj.

Sekvis vigla diskutado, en kiu oni tuŝis ankaŭ la demandon pri la finkonstruo

de la nova kvinetaĝa Domo de la Internacia E-Kursejo en Pisanica.

La pozicion de CE de BEA kaj de LKK de la 63-a UK pri la tuŝitaj problemoj esprimis Nikola Aleksiev — prezidanto de LKK.

Jurnalistoj de Radio Sofio prenis intervjuon de N. Aleksiev pri Esperanto, BEA kaj la 63-a UK. Intervjuita estis ankaŭ J. Jordanov.

Sekvis amika komuna tagmanĝo.

Stara Zagora. Plenkunsido de la Distrikta Estraro de BEA okazis la 15-an de oktobro. Gi traktis la gravajn demandojn pri la nova lernoĵaro kaj pri la organiza kaj financa

stato de la distrikta organizaĵo.

Pli ol 10 membroj de DE prenis la parolon kaj faris tre utilajn konkretajn eldirojn pri la starigitaj demandoj. Estis antaŭviditaj E-kursoj por civitanoj en ĉiuj urboj de la distrikto kaj en la vilaĝoj, kie ekzistas E-societoj. Funkcios kursoj ankaŭ en kelkaj lernejoj.

La kunsidon fermis la psejzidanto de DE Rajno Ĉipilev per konciza entuziasmiga parolado, deklarante, ke honore al la 63-a UK de E-to la instrua kaj organiza E-laboro en la distrikto estos multe pli bone organizita ol ĝis nun.

EKSPozICIO „LA MONDO SUB LA SIGNO DE OKTOBRO — 17“

La 27-an de oktobro al la Kulturdomo de Polski Trâmbeŝ direktiĝis multaj urbanoj por ĉeesti la oficialan malfermon de la ekspozicio sub la supra titolo. Ĉeestis la tuta partia kaj urba gvidantaro, respondeculoj de amasaj organizaĵoj, gejunuloj kaj civitanoj de diversaj generacioj. Gasto de la festo estis ankaŭ k-do Krâstju Karucin, sekretario de BEA.

Donka Velikova el UK de BKP malfermis la ekspozicion. Si rakontis pri la kelkmonata streĉa laboro de la organizantoj (kelkaj amasaj organizaĵoj) kaj speciale pri la valora agado de la lokaj e-stoj. Ĉirkaŭ 300 ekspoziciaĵoj el 39 landoj de ĉiuj kontinentoj rakontas pri la sukcesoj de la unua socialisma lando — USSR, pri la popolaj bataloj en Afriko, en Palestino, en la tuta kapitalisma mondo por nacia sendependeco kaj socia progreso, por paco kaj feliĉo. „Nur la internacia solidareco de la esperantistoj, — substrekiis k-dino Velikova, — ebligis la sendon de tiom multaj kaj interesaj

materialoj, aperintaj en diversaj landoj kaj regionoj.“

K-do Karucin salutis la ĉeestantojn lige kun la bonega iniciato. Li taksis pozitive la nivelon de la ekspozicio, unuiginta la fortojn de la e-stoj kun la fortoj de la aliaj amasorganizaĵoj kaj efike subtenita de la urba gvidantaro. „Jen ekzemplo, — diris li, — kiu montras la praktikan valoron de Esperanto, ĝian partoprenon en la socipolitika vivo.“

Aparte interesa kaj valora estis la angulo de la ekspozicio, kiu rakontas pri la agado de la progresemaj bulgaraj e-stoj kiel propagandantoj de la revoluciaj ŝanĝoj en Rusio, kiel batalantoj kontraŭ la kalumniaj atakoj kontraŭ la juna Soveta Respubliko — ido de Oktobro.

La ekspozicio vekis grandan intereson ankaŭ en aliaj loĝlokoj. Gi vizitos aliajn urbojn de la distrikto laŭ propono de la distriktaj partiaj instancoj.

Ĥristo Manolov

E-AKTIVECOJ EN PLOVDIV DEDIĜE AL OKTOBRO

E-societo „Kulturo“ en Plovdiv kun E-societo „David Sasonov“ en Asenovgrad aranĝis solenan celebren de Oktobro en la kulturdomo de Asenovgrad. Priokazan raporton faris Atanas Gaev. Ajolov el Plovdiv legis siajn versaĵojn, V. Kurteva, artistino, recitis, A. Sopov rakontis humuraĵojn, d-ro Sv. Toŝev rakontis pri gastado de asenovgrada E-koruso en u. Gjula—Hungario. Regis bonega etoso.

Prioktobran kunvenon aranĝis E-societo „Kulturo“ ankaŭ kun la modela popola legejo „Ivan Vazov“ en Plovdiv. Prelegon pri Oktobro faris Zaprijanka Vlaseva. Reci-

tis poezion V. Kurteva. Estis projekciita dokumenta filmo pri Oktobro.

En du el la regulaj ĉiuvendredaj kunvenoj de „Kulturo“ oni aŭskultis la prelegojn „La partopreno de virinoj en la Oktobra Revolucio“ kaj „Vizitoj al Lenin-lokoj“, ambaŭ de Stojanka Maĝunova.

La lasta aranĝo estis viktorigo je temo „Kiam estis fonditaj kaj kiel estis nomataj la komunistaj partioj en diversaj landoj“, gvidata de Penĉo Petrov.

V. Kurteva



En la ĵus pasinta jaro urbo Pleven renkontis la daton 10 de decembro aparte solene. En tiu tago ĝuste antaŭ 100 jaroj ĝi estis liberigita de la rusa armeo kaj rumanaĵ trupoj. Lige kun tiu glora datreveno en la urbo okazis majesta mitingo, kiun partoprenis 50 000 homoj, inter kiuj ĉ. 200 lokaj e-stoj kaj gastoj. Super la centra placo sur pilonoj flertis la naciaj flagoj de Bulgario, Sovetunio, Rumanio. Sur speciala tribuno brilis vortoj karaj por ĉiu bulgara koro: „Al la liberigintoj — eterna gloro kaj danko!“ kaj flanke de ili: „100 jaroj de la epopeo de Pleven“.

Sur la tribuno inter la oficialaj personoj estis la ambasadoroj de USSR, Rumanio, Finnlando, delegitaroj el urboj ĝemelaj al Pleven — Rostov na Donu (USSR) kaj Braila (Rumanio).

Okazis paroladoj lige kun la granda evento. Kun aparta entuziasmo la publiko renkontis la sciigon de la soveta ambasadoro Vladimir Bazovskij, ke laŭ decido de la Supera Soveto de USSR urbo Pleven estas honorita per la alta ordeno „Por amikeco inter la popoloj“.

Je la 11 horo solene kaj majeste eksonis ĉiuj sonorilegoj de la urbo. Cent kanonsalutoj markis la forpasintajn 100 jarojn ekde la liberigo.

Multnombraj florkronoj kaj girlandoj de danko estis metitaj antaŭ la Maŭzoleon de Pleven. Tiajn kronojn oni metis ankaŭ ĉe la maŭzoleon de la pereintaj por nia liberigo rumanaĵ soldatoj apud v. Grivica, Plevendistrikto.

La homamaso direktiĝis al la plej alta loko de Skobelev-parko. Tie antaŭ 100 jaroj la rusaj agloj de la taĉmento de generalo M. D. Skobelev sukcese atakis la fortajn poziciojn de la turkoj. Ĉiu centimetro da tero tie estas surverŝita de rusa sango.

Ce la unua sturmo falis 2400 soldatoj, ĉe la dua — 7000, ĉe la tria — ĉ. 16 000. Sur tiu ĉi altaĵo la bulgara popolo starigis multajn monumentojn de danko kaj amikeco kaj nun la plej majestan — la memorigan panoramon „La epopeo de Pleven 1877“.

La vesperon ĉiuj e-stoj kolektiĝis en la distrikta junulara domo, kie okazis solena kunveno dediĉe al la liberigo de Pleven kaj la naskiĝtago de d-ro L. L. Zamenhof. Pri la vivo kaj la afero de Zamenhof parolis Kunĉo Vălev — sekretario de BEA. Lernantina trupo el la konstrua mezlernejo sub la gvido de sia E-instruistino Marija Nikolĉeva prezentis belartan programon.

Sekvis amuzado kun dancoj kaj amika esperantista kunesto.

La matenon de 11 de decembro ni havis la feliĉon viziti la panoramon „La epopeo de Pleven 1877“. Ĝi estas verko de sovetaĵ kaj bulgaraĵ pentristoj sub la gvido de la merita pentristo de la Rusa Soveta Socialisma Respubliko Nikolao Oveĉkin. En la centra ronda halo sur tolo longa 115 m kaj larĝa 15 m kaj antaŭtola objekta spaco de 2760 kv. m estas montrita la tria sturmo kontraŭ la turka armeo — la plej plena je amasa heroismo kaj dramecaj momentoj. En ĝi kune kun la rusaj regimentoj apud v. Grivica partoprenis la batalon ankaŭ trupo de la juna rumana armeo. La spektanto staras konsternite kaj de la heroismo kaj la sinofero de la rusaj soldatoj, kaj de la majstreco de la pentristoj, kiuj sukcesis prezenti la grandan batalon kiel tute realan, vivan antaŭ la okuloj. La travivaĵo estas profunda, neforgesebla. La panoramo „La epopeo de Pleven 1877“ estas nova, impona sanktejo de la bulgara-rusa amikeco. Ĝin devas vidi ĉiu bulgaro, ĉiu gasto de Pleven.

K. Vălev

SOLENA LITERATURA VESPERO

Imitindas la tradicio de la ĉefurba Literatura E-Rondo okazigi vesperojn dediĉe al la verkaro de elstaraj bulgaraĵ E-verkistoj.

La vespero de la 16-a de novembro 1977 estis dediĉita al la verkaro de Ivan Dobrev, forpasinta fine de aŭgusto. Pri lia vivo, agado kaj literatura kontribuo kortuŝe parolis nia E-veterano kaj verkisto Asen Grigorov.

Ivan Dobrev esperantistiĝis en 1914 — tiam apenaŭ 14-jara ĝimnaziano en u. Karlovo. Nur post kvin jaroj li tre bone tradukis en Esperanton la versaĵon de Ĥristo Botev „Mia preĝo“. La tradukon oni tuj aperigis en „Bulgara Esperantisto“. Ĝis 1928 Dobrev jam esperantigis ĉiujn versa-

ĵojn de Botev, kiuj en 1929 aperis en aparta libreto, tre favore akceptita eksterlande. Ĝis siaj lastaj tagoj Dobrev fervore laboris por firmigo de nialanda E-movado, senlace kaj majstre tradukis versaĵojn ankaŭ de aliaj bulgaraĵ poetoj. Per sia modesta kaj senprofita laboro li multon kontribuis al la plua disvolviĝo de nia E-literaturo.

Riĉan programon el tradukitaj verkoj de I. Dobrev preparis nia artisto kaj konata kanzonisto M. Zdravev. Programerojn plenumis: Simeon M. Simeonov, Vera Văjarova, Jorĵeta Zdraveva, Morjana Văleva, Miĥail Ĉobanov, Miĥail Zdravev, Flori Nikolov. La ĉeestantoj varme aplaudis la programerojn.

Flori Nikolov

LA ESPERANTISTOJ DE „FAJRERO“ EKSKURSI

La 26-an de novembro 1977 la estraro de E-societo „Fajrero“ ĉe la Distrikta Popola Soveto en Varno organizis aŭtobusan ekskurson al Konstanca kaj aliaj ripozlokoj en Rumanio laŭ la bordo de Nigra Maro. La aŭtobuso, propraĵo de la Soveto, estis ornamita per verdaj steloj kaj la emblemo de la antaŭstaranta UK de Esperanto en Varno.

Dum la tuta ekskurso oni parolis kaj ŝercis en Esperanto, multe kantis. La societa estraro trovis konvenan tempon eĉ por pridiskuti kelkajn organizajn demandojn. Estis donitaj abundaj informoj pri la enlanda kaj eksterlanda E-movadoj, pri la taskoj de la e-stoj de Varno lige kun la antaŭstaranta UK.

En Konstanca kaj aliaj loĝlokoj ni konatiĝis kun multaj vidindaĵoj.

Animo de tiu ĉi neforgesebla ekskurso estis k-dino Markrid Karajan — prezidantino de E-Societo „Fajrero“.

Lazar Andreev

NOVAJ E-KURSOJ

Kilifarevo. Lige kun la antaŭstaranta en V. Târnovo TEJO-kongreso vekigis vigla intereso al E-to en urbo Kilifarevo, distrikto de V. Târnovo. Ĉe la Junulara Domo ekfunkciis E-kurso por komencantoj, kiun partoprenas 15 gejunuloj. Kursgvidanto — nia E-aktivulo Donĉo Cankov.

Vidin. Ĉe E-societo „Espero“ en la urbo ekfunkciis elementa kvinmonata kurso, kiun vizitas 18 gejunuloj. La kurson gvidas Georgi Markov. La kursanoj jam sendis siajn unuajn leterojn al eksterlando. Ili preparas sin por la kongresoj en V. Târnovo kaj Varno.

MANIFESTAĴOJ DE AMIKECO INTER BULGARAJ KAJ UMANAJ ESPERANTISTOJ

La 28-an de aŭgusto en Braŝov okazis simpozio je temo „Lingvo kaj kulturaj rilatoj“. Partoprenis ĝin ĉ. 50 e-stoj el la lando, inter kiuj ankaŭ prof. d-ro Aurel Boia — prezidanto de la Rumana Kunordiga E-Komitato. El Bulgario ĉeestis Jordan Kalinov el Ruse. Li prezentis salutojn en la nomo de la e-stoj de Ruse kaj ĝia distrikto, kiu estas ĝemela kun la rumana distrikto ilfov — Bukureŝto. Kalinov transdonis al la rumanaĵoj s-anoj E-librojn, ankaŭ la raporton de Todor Jivkov antaŭ la XI Kongreso de BKP, aperintan en E-to. Li abonigis multajn por „BE“, „Scienca Mondo“, „Paco“, „Heroldo“ kaj „Esperanto“ de UEA. Kun preteco oni akceptis la proponon eldonadi komunan E-bultenon, ĉiun numeron alterne en Bulgario kaj Rumanio. Estis starigitaj ankaŭ aliaj bonaj ideoj pri estonta kunlaborado.

Laŭ anticipa interkonsento la 29-an de oktobro 50 aktivuloj de la E-movado en Ruse kaj ĝia distrikto gastis en Bukureŝto, kie kune kun la rumanaĵoj e-stoj celebris la 60-jaran jubileon de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio. La solenaĵo okazis en la granda Domo de la Kulturo. Malfermis ĝin k-do Bunea Bunesku Jon — veterano de la Rumana Komunista Partio kaj multjara prezidanto de la E-klubo en Bukureŝto. Li salutis la bulgarajn gastojn, kiuj en la spirito de la Septembra Deklaro de k-doj Todor Jivkov kaj N. Ĉauŝesku pri plua firmigo kaj profundigo de la kunlaboro inter BKP kaj RKP, inter PR Bulgario kaj SR Rumanio ekhavis la iniciaton pri aktivigo de la rilatoj inter la bulgaraj kaj rumanaĵoj.

e-stoj. Emociajn vortojn diris ankaŭ k-do Stojĉo Cankov — prezidanto de DE de BEA en Ruse.

Li anoncis ĝian decidon pagi por 5 bukureŝtaj e-stoj la membrokotizojn por UK de E-to en Varno kaj la decidon de DK de BEA en Sofio pagi pri la sama celo por 5 rumanaĵoj e-stoj el la provinco. La sekretario de DE en Ruse Petranka Petrova anoncis la decidon de ĝia junulara sekcio pagi por 3 junaj rumanaĵoj e-stoj la kotizon por la Kongreso de TEJO en Veliko Târnovo. Jordan Kalinov el Ruse sciigis, ke li estas komisiita de E-Societo „Paco“ en u. Bjala sciigi, ke ĝi pagos la kongreskotizon por Varno por la juna E-aktivulo Lucijan Ĝeorgesku el Bukureŝto — redaktoro de la monata E-bulteno „Kune“.

Kun aparta emocio la ĉeestantoj aŭskultis la veteranon de RKP kaj la rumana E-movado St. Osias, kiu parolis pri la Granda Oktobro, la 90-jariĝo de E-to kaj la amikeco inter la bulgaraj kaj rumanaĵoj e-stoj.

Sekvis bonega belarta programo, plenumita de ruseaj kaj bukureŝtaj e-stoj. Fine Plamen Samanĝiev, lernanto en la Muziklernejo de Ruse, ekludis en la salono per sia akordiono vigan rondodancon kaj elkondukis la ĉeestantaron en la korton de la kulturdomo, proksime de la granda bulvardo, portanta la nomon de nia senmorta Hristo Botev.

Kun multaj fotoj, sinceraj brakumoj kaj kisoj, en ies okuloj eĉ kun larmoj, okazis la adiaŭo inter gastoj kaj dommastroj. Sonis el centoj da buŝoj: „Ĝis baldaŭa revido, amikoj kaj fratoj!“



PROFUNDAJ RADIKCJ DE LA AMIKECO INTER BULGARAJ KAJ RUMANAJ ESPERANTISTOJ

Jam ĉe la unuaj paŝoj de la organizitaj bulgara kaj rumana E-movadoj sur ambaŭ bordoj de Danubo komenciĝis viglaj amikaj rilatoj. Amasaj e-staj grupoj reciproke vizitis la unuajn E-kongresojn en Bulgario kaj Rumanio.

La III kongreso de la bulgaraj e-stoj en Ruse (1909 j.) estis vizitita de grupo da rumana e-stoj. Ili invitis la bulgarojn al Bukureŝto. La duan tagon la bulgaraj e-stoj amase veturis kun siaj rumana amikoj al Bukureŝto, kie la kongreslaboro daŭris. Aliĝis ankaŭ 11 serbaj e-stoj el Beogrado. La kongreso ricevis internacian karakteron kaj estis nomita Unua Kongreso de la Apud-danubaj Landoj. Ĝi havis fortan influon sur ĉiujn partoprenantojn. Komenciĝis rapida supreniro de la E-movadoj en Bulgario kaj Rumanio.

La IV kongreso de la bulgaraj e-stoj interkonsente kun la rumana e-stoj decidis, ke la organo de la Bulgara E-Ligo „Lumo“ kuniĝu kun la gazeto „Rumana Esperantisto“. Tiel naskiĝis gazeto „Danubo“ — komuna organo de la bulgaraj kaj rumana e-stoj. Ĝi estis eldonata en Bukureŝto nur en E-to sub la gvido de d-ro Gabriel Robin. Redakcia sekretario estiĝis Nikifor Ĥristoskov, kiu tiucele ekloĝis en Bukureŝto, pagate de la Rumana E-Societo. Li posedis perfekte E-ton, havis bonan stilon kaj aperigis multajn artikolojn en la E-gazetaro. La redakta komitato konsistis el tri rumana kaj tri bulgaraj e-stoj. „Danubo“ estis bonega E-gazeto, kiu aperadis preskaŭ du jarojn. Post la subita morto de d-ro Robin kaj antaŭ la proksimiĝanta periodo de militoj ĝi ne plu povis ekzisti.

„Danubo“ lasis helan spuron en la rilatoj de la bulgaraj kaj rumana e-stoj.

En sia n-ro 11—12 de 1911 j. „Danubo“ donas 8-paĝan korespondaĵon sub titolo „Ekskurso de la rumana e-stoj al Plevn, Sofia, Târnovo“ (5—20. VIII. 1911). Laŭ invito de la Bulgara Esperantista Ligo la rumana grupo, ĉ. 80 personoj, veturis al Sofio por partopreni la kvinan kongreson de la bulgaraj e-stoj. Survoje la grupo vizitis Plevn kaj la sanktan por ĉiu rumano vilaĝon Grivica, kie en 1877 okazis la plej grandaj bataloj inter la turkoj kaj la rumanoj, partoprenantaj la Rusa-Turka Militon per 60 000 soldatoj kiel aliancanoj

de Rusio. Ĉe la Sofia Stacidomo la rumana grupo estis renkontita de multege da sofiaj e-stoj kaj la militista muziko, kiu ludis „La Esperon“.

En la maja numero de „Danubo“ (1912 j.) estas alia interesa korespondaĵo pri ekskurso de rumana e-stoj al Ruse, kiun partoprenis 250 personoj. Ĉe la haveno la gastoj estis renkontitaj de multaj ruseaj esperantistoj, de orkestro kaj la vicurbestro, kiu faris bonvenigan paroladon. La urbo estis ornamita per flagoj — bulgara, rumana kaj Esperantaj. Laŭ speciala programo la gastoj restis du tagojn en la urbo en plej amika atmosfero.

Bedaŭrinde tiuj viglaj amikaj rilatoj inter bulgaraj kaj rumana e-stoj estis rompitaj de la militoj. Ili ne plaĉis al la grandaj imperiismaj fortoj kaj al la burĝaroj en ambaŭ landoj. En la Interaliancana Milito (1913) kaj en la Unua Mondmilito ili starigis ambaŭ popolojn unu kontraŭ la alian. La bulgaraj kaj rumana vilaĝanoj, laboristoj kaj intelektuloj, vestitaj en soldatmanteloj, devis verŝi sian sangon por fremdaj interesoj. Feliĉe, la ruĝa stelo de Oktobro anoncis al la popoloj en la tuta mondo novan vojon — de paco, amikeco, kunlaboro. Tiun vojon sincere ekiris ankaŭ la e-stoj.

Dank' al la venkoporta Ruĝa Armeo — ido de la Granda Oktobro — la popola libero ekbrilis ankaŭ en niaj landoj. Ili nun amike, frate, man' en mano, konstruas novan, feliĉan por ĉiuj, vivon. Antaŭ ni, la esperantistoj el ambaŭ najbaraj socialismaj landoj, staras la granda tasko: kontribui per Esperanto al la firmigo de la tradicia bulgara-rumana amikeco, por triumfo de la spirito de paco kaj amikeco en la tuta mondo. Tio estas plene konforma al la decidoj de la konferenco en Helsinko, al la pacprogramo de la XXV kongreso de KPSU, al la programoj de la Bulgara kaj de la Rumana Komunistaj Partioj.

Antaŭ 65 jaroj sur la frontpaĝo de la rumana-bulgara E-presorgano „Danubo“ estis skribita la devizo: „Venis akvo al nia muelejo!“. Hodiaŭ la esperantistoj el la dekstra kaj maldekstra bordoj de Danubo plenvoĉe povas diri: „Vere venis akvo al nia Esperanto-muelejo!“. Nun ni devas obstine labori kaj labori!

Jordan Kalinov

Vivu kaj floru eterne la amikeco kaj la kunlaboro inter la popoloj de PR Bulgario kaj SR Rumanio!



En la Sindikata Domo de Kulturo en Ŝumen, kie laboras la aktiva juna esperantistino Katja Bojaĝieva, estas organizita konstanta prelegejo „Landoj kaj eventoj“. Enkadre de tiu prelegejo antaŭ la kolektivoj de la distrikta hospitalo, la tabaka fabriko kaj la aŭtomobila uzino prelegis je temo „Islando — lando de kontrastoj“ docento Georgi Dimov el Varno. Li vizitis tiun landon kiel partoprenanto en la 62-a UK de Esperanto.

La multnombra publiko kun granda intereso aŭskultis pri la severa naturo de tiu norda insulo, kie oni povas vidi glaciejojn kaj funkciajn vulkanojn, pri la specifa

beleco de ĝiaj vastaj kamparoj kaj rokaj montaroj, pri la liberama kaj pacama islanda popolo. Oni kun plezuro spektis kolorajn diapozitivojn pri la ĉefurbo Rejkjavik kaj aŭskultis islandajn kantojn. Doc. Dimov informis, ke la sekva 63-a UK okazos en la ĉarma Varno, kaj invitis ĉiujn komenci lerni la Internacian Lingvon, por ke ili mem povu vojaĝi eksterlanden, havi amikojn en la tuta mondo.

Per demandoj kaj eldiroj la aŭskultantoj esprimis sian interesigon kaj kontenton. Ili pliriĉigis siajn konojn pri Islando, kun kiu PR Bulgario havas tradicie amikajn rilatojn.

Cvjatko Todorov

ESPERANTO-RENKONTIGO EN ĈELJABINSK

La 6—8 de novembro en la bela urala urbo Ĉeljabinsk okazis renkontigo, kiun partoprenis 54 e-stoj el 10 urboj. Ĉeljabinskanoj preparis bonan programon kaj varme akceptis la gastojn.

Dum la renkontigo la ĉeestantoj aŭskultis la prelegojn: „60-jara jubileo de la Granda Oktobro“ kaj „La evoluo de Esperanto en Sovetunio post la Granda Oktobra Revolucio“. Reprezentantoj de diversaj kluboj raportis pri sia kluba agado.

Ĉiuj e-stoj partoprenis manifestacion okaze de la 60-a datreveno de la Granda Oktobra Revolucio.

Dum enurba ekskurso ĉeljabinskanoj montris al la gastoj la rimarkindaĵojn de sia urbo, rakontis pri ĝia historio kaj evoluoperspektivoj.

Viktor Zaĥarov

La e-stoj de u. Ĉeska Třebova, Ĉeĥoslovakio, eldonis 24-paĝan broŝuron pri sia urbo kaj ĝia ĉarma ĉirkaŭaĵo. Ili havigos la broŝuron al ĉiu, kiu sendos kontraŭvalore bildkartojn pri sia lando. La bildkartojn oni uzos por E-ekspozicio. Skribu kaj sendu al adreso: Esperanto-rondeto „Amikeco“ — Maria Veleska, Svermova 162, ĈS-560 02 Ĉeska Třebova, Ĉeĥoslovakio.

TRA LA E★ MONDO

OKTOBROFESTA RENKONTIGO EN IVANOVO

Dum la tagoj de tutpopola celebrego de la 60-jara jubileo de la Granda Oktobra Revolucio, en Ivanovo, urbo de gloraj revoluciaj tradicioj, okazis la XVI Centra-Rusia Regiona E-Renkonto (CRRER). Partoprenis ankaŭ e-stoj el Siberio, Ukrainio, Latvio.

Tre gaje pasis la tagoj de la renkontigo. Oni diskutis pri taskoj de sovetaj e-stoj en la lukto por la tutmonda paco, spektis amatorajn filmojn pri antaŭaj E-renkontigoj, kantis kaj deklamis E-poezion. Estis ankaŭ agrabla festa bankedo.

La partoprenintoj de la renkontigo sendis gratulleteron al la Vjetnama Pacdefenda E-Asocio okaze de ties 21-jariĝo. Oni ankaŭ kolektis kaj sendis konsiderindan sumon al la Soveta Pacfonduso.

Dmitrij Perevalov

FORPASIS I. J. BRIL

La 20-an de oktobro 1977 en Harjkov—Ukrainio, forpasis Ivan Jakovleviĉ Bril, naskita en 1904. Sian tutan vivon li dediĉis al la instrulaboro en lernejo. Ellerninte la Internacian Lingvon en 1923, li plene aliĝis al la E-familio kaj aktive, sindone laboris por la disvastigo de E-to.

Aktiva laboro en la Soveta Esperantista Unuiĝo kiel kursgvidanto, organizanto de diversaj E-aranĝoj kaj gvidanto de la E-klubo ĉe la Domo de Sciencistoj en Harj-

kov, dum multaj jaroj delegito de UEA — jen neplena listo de liaj E-aktivecoj. Kaj samtempe tradukisto el rusa en E-ton. Eĉ dum sia lasta tago li okupiĝis pri sia ŝatata laboro — la morto lin trafis tradukanta la novan Konstitucion de USSR en E-ton kaj rakonton por „Ukraina antologio“.

La hela memoro pri I. J. Bril por ĉiam restos en la koroj de liaj amikoj, kunlaborantoj, lernantoj, posteuloj.

D. M. Cibulevskij



De la 23 ĝis la 31 de oktobro en Pollando okazis komplekso de aranĝoj, kiuj certe puŝos antaŭen la aplikadon de E-to en la internacia turismo.

La inaŭguron de la *III Internacia Foiro de E-Turismo* en urbo Bidgoŝc (Bydgoszcz) partoprenis estraranoj de Monda Turismo (asocio por faciligo de la internacia turismo per aplikado de Esperanto), aktivuloj de E-turismo kaj gastoj el Aŭstrio, Bulgario (18 personoj), ĈSSR, Finnlando, GDR, Hungario, Pollando, USSR, kaj s-ro Ĉarlz Pouer (Charles Power) — Konstanta Kongresa Sekretario de UEA.

Bonvenigajn vortojn diris mag. A. Gjembovski — prezidanto de Monda Turismo kaj direktoro de vojaĝoficejo „Juventur“ en Bidgoŝc. Poste reprezentantoj el diversaj landoj koncize parolis pri turismaj iniciatoj, kiujn oni efektivigis.

La *5-an Internacian Trarigardon de Diapozitivaj „Esperanto-Sorero 1977“* partoprenis dudeko da personoj. La ĉeestantoj povis vidi interesajn kolorajn bildojn el Islando, Bulgario (mara E-feriado kaj la Internacia E-Kursejo en Pisanica), Japanujo, Greklando, Skoltan E-Tendaron el Pollando ka. Trian premion ricevis polo pro siaj diapozitivaj faritaj dum feriado en Pisanica.

La *Seminario pri Internacia Sendeviza Interŝanĝa Sistemo* estis gvidata de s-ano A. Gjembovski. La ĉeestantoj povis pli detale studi kaj diskuti la sistemon, ĉar ili ricevis skriban materialon pri ĝi. Estis decidite aplikadi tiun sistemon ankaŭ en la Internacia E-Turismo.

Per buso de „Juventur“ ni vojaĝis pli ol 1200 km tra Pollando kaj vizitis kampadejojn, ripozdomojn, vidindaĵojn ka., kiujn la Turisma Centro de Pola E-Asocio kaj „Juventur“ ofertas por feriado de eksterlandaj E-grupoj. Tre forte impresis nin la plej granda kastelo en Eŭropo—Malberk.

La renkontiĝoj kun e-stoj en la urboj Grudziadz kaj Torun estis tre bone aranĝitaj. Nia Movado certe pli rapide progresus, se oni pli ofte okazigus tiaspecajn interesajn kaj altnivelajn aranĝojn. En la etnografia muzeo de Torun ni ne nur povis ekkoni ĝiajn eksponaĵojn, sed ankaŭ ĉeestis folkloran spektaklon.

En Torun okazis viglaj *estrarkunsidoj* de Monda Turismo. Oni konstatis, ke lastatempe la E-organizaĵoj donas pli grandan atenton al la E-turismo, estas efektivigitaj pli multe da turismaj aranĝoj. La *ĝenerala kunveno de Monda Turismo* kun elekto de nova estraro okazos enkadre de UK en Varno. La estraro proponis al la ĉeestanta KKS de UEA, ke la tuttaga ekskurso al Albena — Balĉik kaj Pobiti Kamani estu

organizita en kunlaboro kun Monda Turismo. La aperigo de la asocia bulteno estas certigita.

Grandan atenton oni donis al la *turisma E-kalendaro*. La nova kalendaro entenos pli da utilaj informoj por la turistoj e-stoj. Ĝin ricevos senpage la membroj de Monda Turismo kaj la aktivuloj, kiuj okupiĝas pri turismo.

Pro la bona funkciado de la buslinio „Esperanto“ inter Pollando kaj Bulgario, Monda Turismo rekomendis ĝin ankaŭ por 1978 j.

Oni konstatis, ke ĝis nun nur en Pollando kaj Aŭstrio Monda Turismo efektivigas turismajn aranĝojn. Estonte tion faros ankaŭ la asocia sekretariejo en Sofio.

Monda Turismo pli aktive helpas la E-turisman kaj precipe la organizitan grupan turismon. Ĝi kunlaboros pli vaste kun esperantistaj kaj ĝeneralaj organizaĵoj kaj oficejoj por aplikado de Esperanto en turismo.

En Zakopane *seminaron* „Stato kaj perspektivoj de la E-Turismo“ gvidis d-ro T. Tiblevski. Dum la seminario estis faritaj tre bonaj proponoj kaj sugestoj. Sajnas al mi, ke la temo estis tiom vasta kaj ampleksa, ke ni devis dediĉi minimume tutan tagon al ĝia pridiskuto.

La *Internacian Renkontiĝon „Zakopane-77“* partoprenis ankaŭ granda grupo de slovakaj e-stoj. Ludis bona E-orkestro. La bulgara grupo, instigita de la ĉeestantoj, kantis kaj ludis rondodancojn el Rodopi-montaro. La popoldancojn kaj la gajan kanto-ludon „Vagonaro“ partoprenis multa publiko.

Dum la *III Internacia Foiro de E-Turismo* estis subskribitaj kontraktoj pri interŝanĝo de E-grupoj el Aŭstrio, ĈSSR, Bulgario, Finnlando, Hungario kaj Pollando.

Nikola Nikolov

Reprezentanto de Monda Turismo en Sovetunio

La estraro de Monda Turismo — asocio por faciligo de la internacia turismo per aplikado de Esperanto — decidis, ke reprezentanto de la Asocio en Ukrainio, USSR, estu s-ino Nadia Andrianova, prospekt P. Tiĉina 26, kv. 162, SU-252 173 Kiev, USSR (tel. 50-79-87).

Pere de s-ino Andrianova oni povas fariĝi membro de Monda Turismo.

Mi estas leganto de via gazeto ekde unu jaro, dank' al la afableco de mia korespondamiko Dragolov el urbo Trojan.

Kun granda intereso mi legis en n-ro 5/1977 la valoran instigoplenan artikolon de Ida Lisičnik „Ĉu por aŭ per Esperanto?“ La aŭtorino estas tute prava, kaj mi esperas, ke ĉiu aktiva e-sto sub la efiko de ŝia artikolo retaksos sian E-agadon, por „ne kuirigi en propra saŭco“, sed por doni siajn lingvoservojn de la Internacia Lingvo en servoj al la socio, fari pere de ĝi ian sociutilan agadon sur la kampo de amikeco kaj interkompreniĝo de diversaj laborkolektivoj.

Mi proponis miajn konojn de Esperanto al la direktorino de nia infanĝardeno. Ŝi arde akceptis mian proponon, ĉar la laborkolektivo deziras kontakti kun similaj laborkolektivoj en diversaj landoj. Por komenco mi trovis por ili la laborkolektivojn de infanĝardeno en Bulgario (urbo Trojan) kaj en Sovetunio (urbo Voronej). Ili intencas interŝanĝi infandesegnaĵojn, profesiajn spertojn ka., kaj la amikeco inter ili disvolviĝos en pli granda skalo.

Same tiel mi proponis miajn lingvoservojn (senpage) al la loka societo de soveta-ĉeĥoslovaka amikeco por kontaktigi ĝin kun klubo de internacia amikeco en la rusa urbo Gorkij, kie mia korespondamiko montris intereson fariĝi peranto de tiaspeca amikeco. Tiamaniere ni, du e-stoj, ebligos la konkretan amikecon inter la membroj de la parencaj societoj, kiuj deziras disvolvi sian agadon al pli alta nivelo.

Plue mi proponis similan servon al modela minista laborgrupo, kiu pro sia meritplena labora kaj sociutila agado ricevis la honoran oran insignon de la Sindikatoj kaj nun intencas plivastigi sian kromlaboran agadon per amikaj kontaktoj kun samprofesia laborkolektivo en iu ajn socialisma lando. Ĉar por tia serĉado ne estas sufiĉaj nur miaj Esperantaj korespondamikoj, mi direktas al vi mian peton pri helpo — publikigu mian alvokon al spertaj e-stoj, loĝantaj en ministraj loĝlokoj de diversaj landoj.

Mi kredas, ke ili trovos konvenan laborkolektivon. Tiel la e-stoj, kiuj fariĝos perantoj de tiaspeca amikeco de ministroj, faros per tio ĉi samtempe kaj sociutilan agadon, kaj efektivan propagandon per E-to por E-to. La bezonoj de la socio kreskas, plivastiĝas la intereso de la laboruloj. Do ni, esperantistoj, eltrovu kaj subtenu la interesojn de diversaj laborgrupoj en nia ĉirkaŭaĵo kaj helpu al tiaj grupoj efektivigi internaciajn kontaktojn kun samprofesiaj, kun saminteresuloj.

Mi estas konvinkita, ke pere de tia agado la vico de la interesuloj pri uzado de la Internacia Lingvo kreskos pli rapide ol pere de la ĝisnuna agado.

Mi salutas vin samideane kaj elkore!

Via leganto

Vojtěch Trojan, str. B. Němcové 364/B,
ČS-542 01 ŽACLÉŘ — Ĉeĥoslovakio

RAPIDU POR LA BELARTAJ KONKURSOJ

Esperantistaj verkistoj kaj verkemuloj atentu, ke proksimiĝas la limdato por la Belartaj Konkursoj de UEA. Kiel lastjare, la branĉoj estos: originalaj prozo, poezio kaj dramo; originala eseo (premio Luigi Minnaja, konsistanta el la jara rento de 4000 guldenoj tiucele donacitaj de la familio Minnaja); fotografio. Por ĉiuj branĉoj krom fotografio la konkursaĵoj devas atingi la sekretarion de la Belartaj Konkursoj (s-ron Alec Venture, 7 Grosvenor Rd., Wallington, Surrey SM6 OEG, Britujo) ĝis la 31 de marto. Konkursaĵoj por la fotografia branĉo sendu al Foto-Konkurso, p. a. Loka Kongresa Komitato, kien ili trafu ĝis la 30 de junio.

Detalajn regulojn vidu en la libreto „Statuto kaj Regularoj de UEA“, kun ŝanĝoj laŭ p. 164 de revuo „Esperanto“, 1976, oktobro.

NI KONDOLENCAS

En B. Slatina forpasis 65-jara nia aktivulo

Hristo Kacarski

Preslaboristo, li ellernis Esperanton en 1932 kaj havis multajn korespondantojn tutmonde. Li multe kaj sukcese propagandis la lingvon.

Forpasis 72-jara nia E-aktivulo, eksmembro de CE de BEA kaj honora membro de BEA

Dinko Šiškov

Li estis fidela adepto de la Internacia Lingvo kaj fordonis 25 jarojn al aktiva E-agado en Pârvomaj kaj Pazarĝik.




Peju K. Javorov (1. 1. 1877—16. 10. 1914), elstara bulgara poeto-lirikisto, naskiĝis en la suda urbo Ĉirpan. Post la gimnazio li oficis kiel telegrafisto, poste — kiel bibliotekisto en la Nacia Biblioteko kaj dramaturgo en la Nacia Teatro en Sofio.

Kiel junulo Javorov partoprenis aktive la socialistan movadon, poste — la batalon por liberigo de Makedonio el osmana jugo.

En lia verkaro de tiu unua periodo dominas la socialaj kaj civitanaj motivoj. Ĉefa temo estas la suferoj de la laborvilaĝano, kies figuron la poeto pentras kun granda poezia forto en la poemoj „Sur la agrokampo“ kaj „Hajlo“. El liaj verkoj de tiu periodo ŝprucas protesto kontraŭ la sociaj maljustoj. La poeto estas kritika realisto.

Post la grandaj batoj sur la naciliberigan movadon de Makedonio kaj la pereco de Goce Delĉev — gvidanto de la batalo, lia bona amiko, Javorov malesperiĝis je la sociaj bataloj kaj lia poezio fariĝis pesimisma. Sub la influo de la modernisma poezio li iĝis fondinto de la simbolismo en la bulgara literaturo. Lia poezio de tiu periodo estas senespera kaj kontraŭdira, esprimo de tragediaj animstatoj. Sed ankaŭ tiam ĝi estas plena je profunde etika enhavo. La poeto starigas maltrankvilplenajn demandojn pri la senco de la homa vivo, okupiĝas pri abstraktaj, eksterteraj problemoj, kiujn „neniu jarcento solvis“. Lia sentema koro sufokiĝas en la atmosfero de la hipokrita burĝa socio. La poeto-humanisto ankaŭ en sia tragiko serĉas la vojon de homo al homo. En tiu tempo li multe verkas poezie kaj proze pri la naciliberiga batalo en Makedo-

P. K. Javorov



nio, la biografion de la granda revoluciulo Goce Delĉev kaj multajn profunde emociigajn versaĵojn kaj poemojn. Al lia plumo apartenas ankaŭ du dramoj („En la piedoj de Vitoŝa“ kaj „Kiel post tondro la eĥo estingiĝas“). Dum la lastaj jaroj de sia maltrankvila vivo, post ĉiuj duboj kaj serĉadoj, Javorov revenas al la kredo de sia juneco — la kredo je la socialismo.

La meritoj de Javorov por la disvolviĝo de la bulgara poezio estas grandegaj. Li estas unu el la klasikuloj de la bulgara verso.

Sube ni donas du versaĵojn de Javorov el la komenca kaj posta periodo de lia verkaro.

AL UNU PESIMISTO

Jes, la popolo sklavas, ĝi dormas en silento,
en plena apatio, sen zorgo, sen lamento,
sen grumblo iu ajn:

ĝi portas ferkatenojn kaj mortas en sufero,
kvazaŭ feliĉon trovas en sia mallibero,
jes, sklavas ĝi laŭ ŝajn'.

Sed frato, ne blasfemu, ne damnu, ne fi-nomu:
nur ŝajne ĝi ne vidas, ke venas la malbono,
ke akre ungas ĝi

kaj suĉas, kaj elsuĉas la lastan sangoguton
de la popola korpo, kiu sin donis tutan:
kial eraras vi?

Mi scias: vi ĝin amas pro ĝia jug' jarmila
kaj kun dolor' insultas ĝin kun sopiro fila —
mi bone konas vin. . .

Ĉar vi kun ĝi elkreskis, ĉar kruda par' amara
mangaĵo via estis. . . Sed diru, filo kara,
ĉu vi ekkonis ĝin?

Ho ve, se vi ekscius pri la sekretaj plendoj,
pri la ĉagrenoj koraj, angoro kaj turmentoj,
pri ĝia sklava sort', —

vi pro terur' ektremus, ne damnus sen kompatato,
vi plorus pri l' destino, pri l' malfeliĉa fato
kiel pri patra mort'.

Kaj ĝi kuntiras brovojn, koleras pri l' sklaveco,
ĝi sentas la profundon de l' vivo-maljusteco,
sed ne de sia fort'. . .

Ĉar la destinton nigran pro l' plagoj ĝi kulpigas
kaj kun rigard' ĉielen indulgon ĝi avidas,
ĝi blindas en la nokt'.

Al ĝi vi iru, iru: de via lumo pura,
de scitrezoro via — en la mallum' obskura
radios la seren'.

Ekvidos ĝi kaj tiam katenon sian ŝiros
kaj al estont' feliĉa la ĝustan vojon iros
per propra sperto mem.

El la bulgara: Aser Grigorov

PAVLETA BRAVA KAJ PAVLETA-EDZINO JUNA

Al Penĉo Slavejkov

Jus de la ĉevalo saltis nekonato,
kaj ektondris sur la pordo bat' post bato.

Li bategas, vokas per voĉo fortika:
«Ĉu vi dormas? He, malfermu do, Aglika!»

— Kiu? — «De Pavleta el Konstantinopolo
portas mi sulutojn, mia dolĉa koro.»

Ruzo en la vira brusto ekperfidas,
lia voĉo vibras, ŝi al li ne fidas.

— Vagas elirintaj el la tomb' fantomoj,
kaj en nokta horo misintencaj homoj;

iru vian vojon, homo nekonata,
aŭ mi tuje vokos por helpo bofrata!

Per rigardo agla fulmis la okuloj,
laŭte kriis base la juna bravulo:

«Se mi kiskus pordon, tuj eksplodus flamo;
lasu min eniri, mia kora amo!»

Lia koro batas, en la brusto ŝtormas,
treman voĉon tamen edzin' ne rekonas. . .

Tuj Aglika flustre, kun soif', avide
post fertika pordo diras tutrapide:

— Mizerul', vi volas senti min, trompegi;
se Pavleta vi, do kiel al vi kredi?

«Kvin jarojn mi vagis. . . Lumis dum la migroj
du okuloj bluaj sub la brovoj nigraj.»

— Ilin konas ĉiu en vilaĝo nia. . .
Ili tamen lumas por Pavleta mia!

«La galanto blanka — sur vizaĝo hela,
poplo svelta kampe — la talio bela.»

— Ha, pro ili fraŭloj multaj min sopiris,
sed kun longa nazo de la pord' foriris!

«Sed ĉe l'brust' maldekstra la lentugo nura. . .
Kaj kroneto supre sur la mam' velura?»

La unua nokto — ĉiam memorinda!
Lipo mia restis kun cikatro ringa. . .»

Grincis pordo peza, tremis lia koro.
Karulin' ekpendis sur bravula kolo.

El la bulgara: Asen Grigorov

I N V I T O

de Nevena Nedelĉeva

Tre kara amikino,

Mi sentas min feliĉa inviti vin al la
63-a Universala Kongreso de Esperanto,
kiu okazos en nia belega urbo Varno en 1978.

Mi ne volas laŭdi mian patrolandon,
sed kiam vi venos, vi vidos, ke ĝia
naturo estas vere belega. Vi vidos altajn
montarojn, en kies sino kuŝas kristale puraj lagoj,
riveretojn, kiuj fluas tra valoj kaj ebenaĵoj,
inter agroj kaj vinberkampoj superŝutitaj defruktoj.
Kaj nenie vi vidos limon inter ili.
Tio estas neordinare bela vidaĵo.
Ĉio apartenas al la tuta popolo.

Laŭlonge de la bordo de Nigra Maro
troviĝas urboj kaj vilaĝoj, inter kiuj

plej bela estas urbo Varno, kie okazos
la tutmonda kongreso de la esperantistoj.

La maro ĉiujare allogas centojn da
miloj el tiuj, kiuj amas ĝin kaj ĝiajn
sabloplaĝojn, varmigitajn de ardaĵoj sunradioj.

Vin, kiuj loĝas ĉe la bordo de Mediteraneo,
la akvo de Nigra Maro eble ne impresos,
sed mi estas certa, ke niaj montaroj plaĉos al vi.

Post la kongreso ni partoprenos ekskurson
al nia ĉarma montaro Rodopi. Vi spiros tie
mirinde freŝan aeron. Viaj okuloj ĝuos la
senfinajn koniferaĵojn sur ĝiaj altaj deklivoj,
la bluan ĉielon, la orajn sunradiojn,



kiuj surverŝas la tutan montaron.

La aŭtobuso, per kiu ni veturos, haltos en la koro de Rodopi-montaro ĉe tute malgranda vilaĝeto.

— Kial? — demandas min viaj okuloj.

Mi ridetas kaj respondas:

— Vi vidos.

Ni marŝas kelkajn minutojn, kaj jen — antaŭ ni starigas granda, kvin-etaĝa konstruaĵo — la Esperanto-Kursejo, en kiu esperantistoj el ĉiuj landoj dum la tuta jaro povas lerni Esperanton.

Nia bona samideano Jordanov, la plej grava iniciatinto de tiu konstruaĵo, kun siaj helpantoj, ĉiuj el la regiono de la montara urbo Smoljan, atendas nin antaŭ la ŝtuparo, afable invitas nin eniri.

La lipoj ridetas, la okuloj brilas rigardante tion, kion oni montras al ni: jen lernoĉambroj por komencantoj, por progresintoj, por kandidat-instruistoj de Esperanto. Jen la dormoĉambroj por familioj, por unu aŭ du personoj, ĉambroj por pli grandaj

grupoj — por ĉiuj, kiuj volas loĝi en tiu ĉarma loko kaj lerni la lingvon de la internacia amikeco. Poste ni eniras salonon, kie la esperantistoj aŭskultos prelegojn, belartajn programojn, koncertojn.

Ĉu vi scias, kara amikino, ke ankaŭ vi povas ĉeesti la inaŭguron de tiu ĉi grandega tutmonda Esperanto-lernejo? — Ne? — Tiam sciu kaj estu bonveninta! Per vi mi invitas ĉiujn samideanojn el Sabadell kaj el tuta Hispanio. Sed mi invitas ankaŭ la esperantistojn el ĉiuj landoj, el la tuta mondo veni, partopreni la Universalan Kongreson en Varno kaj poste ĉeesti la inaŭguron de la Esperanto-kursejo.

Vi povas resti tie tiom longe, kiom vi deziras. La montaro, ĝiaj beleco kaj freŝeco, plenigos vin per nova amo al la vivo kaj per deziro lerni Esperanton. Vi sentos vin renovigita, ĉar la montaro kaj la lernado refreŝigas kaj alten levas la homon.

Elkore salutas vin: N. N.

Verdaj steloj

TODORKA BOGDANOVA

MIA AVO LERNAS RUSAN LINGVON

Dum la liberigo mia patrino estis 7—8-jara knabineto, sed ŝi bone memoris la eventojn de tiu tempo. Kvankam nur alfabetkona, ŝi scipovis bone rakonti. Kiam mi kaj mia fratino estis infanoj, ni ne lasis ŝin trankvila, ĝis ŝi denove ne rakontis al ni ion pri la alveno de „bratuŝki“¹ en urbon Veliko Târnovo.

La gepatra domo de mia patrino troviĝas apud la fontano „Derviŝka“ kon'raŭ „Sveta Gora“ (Sankta Arbaro), super la rivero Jantra mem. Tie bone aŭdiĝis la pafoj dum la ofensivo ĉe la rusoj.

„La fenestraj vitroj tremis pro la fortaj pafoj, — komencis rakonti mia patrino. — Mia patro senĉese krucsignis antaŭ la ikono kaj preĝis: „Bona dio, protektu la rusajn bra-

tuŝki!“ Kaj tio daŭris preskaŭ la tutan tagon.

Kiam la pafoj ĉesis, kaj evidentiĝis, ke la turkoj jam estas forpelitaj, paĉjo ĵetis sian fezon², prenis blankan tukon kaj volvis ĝin ĉirkaŭ la kapon, poste kaptis min kaj mian fratinon je la manoj, kaj ni eliris ekstere. Ni aliĝis al la homoj de la tuta

¹ „Bratuŝki“ — karesnomo, kiun la bulgara popolo ame donis al la rusaj soldatoj-liberigintoj. La vorto enradikiĝis vaste kaj estas uzata ankaŭ nun. Ĝi estas prenita el la rusa lingvo kaj signifas „fratetoj“.

² Fezo — iama ruĝa turka ĉapo.

kvartalo, elirintaj por renkonti la liberigintojn, kiuj jam eniris la urbon. Ni surŝutis ilin per floroj, brakumis ilin, intermiksiĝis kun ili, kaj tiel triumfe marŝis tra la tuta urbo ĝis vesperiĝo.

En ĉiu domo esits invititaj rusaj soldatoj. Kun granda ĝojo ni akceptis la du „bratuŝki“, kiujn mia patro venigis hejmen. Laŭ malnova bulgara kutimo mia patrino renkontis ilin kun freŝa blanka bulko. La malsataj kaj lacaj soldatoj manĝis kun granda apetito kaj ripetadis: „Bona bulka, bona bulka!“³ Neniu el ni komprenis, kion ili volas diri, nur paĉjo korektadis ilin, asertante, ke panjo jam delonge ne plu estas „bulka“, sed ili ne ĉesis ripetadi tion. Tiel ni ne komprenis unu la alian. Nur poste ni eksciis, ke ili nomis la blankan panon „bulka“.

Unu el la soldatoj, kiu certe havis knabineton je mia aĝo, tenis min konstante sur siaj genuoj, karesis miajn harojn kaj ripetadis: „Mia doĉka, mia doĉka!...“. Paĉjo denove korektis lin, ke ne „Doĉka“, sed Senka (Poliksena) estas mia nomo... Poste ni eksciis, ke ruslingve „doĉka“ estas filineto...“

Post jaroj, kiam mi kaj mia fratino fariĝis gimnazianinoj, ni ofte rememoris la „rusan lingvon“ de mia avo.

Mia patrino daŭrigis sian rakonton: „Kiam niaj „bratuŝki“ decidis foriri, ni longe ĉirkaŭbrakis ilin kaj ploris. Tiu soldato, kiu nomis min

„doĉka“ kaj konstante karesis min, antaŭ la disiĝo deprenis de sia kolo kruceton kaj metis ĝin ĉirkaŭ mian kolon. Mi eĉ nun portas ĝin kaj mi portas ĝin ĝis la fino de mia vivo!“

Post la bombardo de Sofio en januaro 1944 nia familio evakuiĝis en urbon Bjala Slatina. Tie trafis nin la Naŭa de Septembro 1944⁵, tie ni renkontis la Ruĝan Armeon. Miaj du filoj — 7- kaj 10-jaraj — rapide preparis flagon el ruĝa ŝtofo, pentris sur ĝi per bronza farbo kvinpintan stelon, serpon kaj martelon. Kun ĝi ili bonvenigis la partizanojn kaj la politikajn malliberulojn, kaj iom poste ankaŭ la ruĝarmeanojn, enirintajn en Bjala Slatina.

Apud la urbo estis provizora aerodromo, kiun miaj infanoj ĉuitage vizitis, fanfaronante, ke ili eniris en verajn sovetajn aviadilojn. Iun tagon ili alkondukis hejmen du ruĝarmeajn pilotojn — Tolja kaj Saŝa. Saŝa havis frateton samaĝulon al mia malgranda filo Viktor, kies nomon li ankaŭ portis. Saŝa ĉiam ĉirkaŭbrakis mian filon kaj nomis lin „Vitja“⁶. Ripetiĝis la travivaĵo de mia patrino kun „bratuŝki“...

Miaj infanoj kun ĉagreno adiaŭis siajn novajn amikojn. Ĝis nun ili konservas iliajn portretojn kiel karan memoraĵon.

Nun miaj genepoj ege ŝatas, ke mi rakontu al ili verajn okazintaĵojn, kaj mi ofte rakontas pri la rusaj „bratuŝki“, kiuj dufoje liberigis Bulgaron.

El la bulgara: Rajna Konstantinova

³ En rusa lingvo „bulka“ estas bulko, en bulgara lingvo „bulka“ estas junedzino.

⁴ Ruslingve „doĉka“ — filineto, bulgarlingve „Doĉka“ — virina nomo.

⁵ 9. IX. 1944 — tago de liberiĝo de la bulgara popolo elsub la faŝismo.

⁶ „Vitja“ — en la rusa lingvo — karesnomo de Viktor.

Dum la Gajaj E-Tagoj en la komenco de aprilo en Sofio, Bulgario, estos premiitaj la plej belaj kaj interesaj karikaturoj je kia ajn temo kun klariga teksto en Esperanto, senditaj al: Gajaj Tagoj en Sofio, p. k. 45, BG-1000 Sofio, Bulgario.

Oni povas sendi originalajn kaj neoriginalajn karikaturojn. Ili devas esti nur desegnitaj per tuĉo kaj havi klarigan tekston en E-to.



La monata revuo «Teatâr» en sia kajero 5 aperigis artikolon „La Bulgara Esperanto-Teatro“ de la konata franca esperantisto Michel Duc Goninaz, verkita speciale por la revuo.

En j. «Borba» — u. Veliko Târnovo (12. V): informo pri kontaktoj inter la lokaj e-stoj kaj la e-stoj en la ĝemela urbo Poltavo (USSR).

En la sama ĵurnalo (1. XI): informo de Penka Gârbuzanova pri inaŭgurita ekspozicio „La mondo sub la signo de Oktobro 17“ en u. Polski Trâmbeș. La materialoj por la ekspozicio estas liveritaj pere de internaciaj kontaktoj de la lokaj e-stoj.

En j. «Septemvrijsko Zname» — u. Pazarĝik (25. VI): informo de Konstantin Genčev pri gastado de franca esperantista familio en Pazarĝik.

En j. «Septemvri» — u. Stara Zagora (18. VIII): skizo sub titolo „Kun malfermita koro al la tuta mondo“ de Maria Balikova — pri Kanju Kanev — prezidanto de la E-societo en u. Gâlâbovo.

En la sama ĵurnalo (6. X): artikolo „Simbolo de interkompreniĝo, amikeco kaj paco“ de Ivan Dečev — okaze de la komenciĝo de la E-lernoĵaro.

En j. «Rabotničesko Delo» — Sofio (28. VIII): artikolo pri la pereinta en la antifaŝista batalo heroo Nikola Botuŝev. Oni mencias ankaŭ lian E-agadon.

En la sama ĵurnalo (1. XI): informo pri la ekspozicio „La mondo sub la signo de Oktobro 17“ en u. Polski Trâmbeș (vd. supre — „Borba“).

En la sama ĵurnalo (5. XI): artikolo sub titolo „Dum tiuj foraj jaroj“ de Ivan Hangev el u. Kotel pri la fruktodonaj ligoj de la bulgaraj e-stoj kun la e-stoj en Sovetunio antaŭ 50 jaroj.

En la sama ĵurnalo (14. XII): grava artikolo, trikolumna, sub titolo „Por kontaktoj kaj interkompreniĝo. La kontribuo de la E-movado“ de N. Kjučukov, vicprezidanto de BEA.

En j. «Naroden Drugar» — u. Jambol (6. IX): informo pri renkontiĝo de la lokaj e-stoj kun hungara e-stino.

En j. «Narodno Delo» — u. Varno (15. IX): informo pri prelego pri Islando kaj la 62-a UK de Esperanto fare de doc. G. Dimov.

En la sama ĵurnalo (4. X): informo pri la partopreno de la Stata Pupteatro de Varno en la esperantlingva Pupteatra Internacia Festivalo en Zagreb (Jugoslavio).

En j. «Ŝumenska Zarja» — u. Ŝumen (20. IX): informo pri vespero dediĉe al la bulgara-pola amikeco, aranĝita de la lokaj e-stoj. Parolis d-ro L. Conev, partopreninto en la Internacia Renkontiĝo de medicinistaj

e-stoj en Krakov, Pollando, en julio 1977.

En la sama ĵurnalo (29. IX): artikolo de Cvjatko Todorov pri la ligoj de ŝumenaj e-stoj kun la e-stoj en la ĝemela urbo Magdeburg (GDR).

En la sama ĵurnalo (11. X): informo de Cvjatko Todorov pri regiona konferenco de la E-pedagogoj, okazinta en Ŝumen.

En la sama ĵurnalo (13. X): informo de Jordan Ivanov pri la nova E-lernoĵaro en u. Preslav.

En la sama ĵurnalo (1. XI): artikolo „La afero de la revolucio estas sankta por ni“ de C. Todorov — pri la ligoj de la lokaj e-stoj kun la sovetaj e-stoj en la pasinteco kaj nun.

En j. «Večerni Novini» — Sofio (21. IX): informo pri kunveno de la Sofia E-Societo „M. Gorki“, en kiu Werner Gafke el GDR prelegis je temo „La galerio de Drezden“.

En la sama ĵurnalo (6. XII): informo pri E-kurso ĉe la Junulara Domo „Liljana Dimitrova“ en Sofio.

En j. «Preslavska tribuna» — u. Preslav (26. IX): ampleksa informo de d-ro Georgi Popov pri la internacia renkontiĝo de la medicinistaj e-stoj en Krakov (vd. supre — „Ŝumenska Zarja“). En la sama numero: informo pri baldaŭ malfermotaj E-kursoj.

En j. «Dunavska Pravda» — u. Ruse (20. X): artikolo „Esperanto 90-jara“ de Stefan Popov.

En j. «Karlovska Iskra» — u. Karlovo (16. XI): artikolo „La kontribuo de la e-stoj“ de inĝ. Bojdar Leonov pri E-aranĝoj en la urbo lige kun la 60-jara jubileo de la Oktobra Revolucio.

En j. «Zemedelsko Zname» — Sofio (6. X): informo sub titolo „Apud u. Smoljan konstruaĵo por internacia E-lernejo“ de la propra korespondanto de l'redakcio Strahil Bostanĝiev (kun foto de la konstruaĵo).

En j. «Otečestven Front» — Sofio (23. XI): en artikolo pri la venontjara temaro de la ĵurnalo oni sciigas, ke la redakcio disponigos lokon por „gravaj E-novaĵoj“.

En la sama ĵurnalo (10. XII): ampleksa artikolo de la redakcia ĵurnalisto Angel Andreevski je temo „Ĉu la homoj povas interkompreniĝi sen tradukistoj?“. Esencaj informoj pri E-to kaj la E-movado kun mencio pri la antaŭstarantaj 63-a UK en Varno kaj 34-a junulara kongreso en V. Târnovo.

En j. «Otečestven Zov» — Vraca (16. XII): artikolo „L. L. Zamenhof — kreinto de E-to“ de Bojčo Mladenov.

En la sama ĵurnalo (20. XII): informo materialo pri E-kunveno de la lokaj e-stoj lige kun la naskiĝtago de Zamenhof, kiun ĉeestis ankaŭ Nikola Aleksiev — prezidanto de MEM kaj LKK de la 63-a UK en Varno. La materialo informas ankaŭ pri kunsido de Aleksiev, lokaj oficialuloj kaj gvidaj e-stoj, en kiu oni pridiskutis la programon de la antaŭkongresaj tagoj (25—28 de julio 1978) en Vraca.

REGIONA METALURGIA KOMBINATO (RMK) „BALKANSKA ZVEZDA“ — TROJAN

VENTOLILOJ POR KLIMATIZAJ INSTALAĴOJ TIPO „BKU — 1“

La ventolilo tipo «BKU — 1» elsuĉas el bestbredejo aeron, gasojn kaj vaporaĵojn (sen mekanikaj almiksaĵoj) ĝis maksimuma temperaturo 313,16° K.

La ventolilo povas ankaŭ enblovi freŝan aeron el la atmosfero tra la ventol-aperturoj kaj elpuŝi eksteren la gasojn, la malpuran aeron kaj la vaporaĵojn.

La ventoliloj ekfunkcias pere de durapideca elektromotoro, kio donas eblecon subteni temperaturon laŭdezire.

TEKNIKA KARAKTERIZO

Indikoj	I grado	II grado
Turnoj de la ventolilo en minuto	1420 tr/min	720 tr/min
Produktiveco ĉe maksimuma koeficiento de utila funkciado (maks KUF)	2,08 m³/s	1,04 m³/s
Premado ĉe maks KUF	14 da N/m²	3,6 da N/m²
Koeficiento de utila funkciado (KUF)	68%	68%
Potenco de la elektromotoro	0,300 kW	0,120 kW
Diametro de la laborrado	500 mm	500 mm
Periferia rapideco de la laborrado	37 m/s	19 m/s
Nombro de ŝoveliletoj de la laborrado	5	5

Telefonoj: direktoro 23—26
vendofako 23—29

Bankokonto 280 015 ĉe Bulgara
Nacia Banko — Trojan.

deziras korespondi

Brazilo

Adalberto P. de Arruda — R. Manoel Leite Magalhaes 158, 18.100 — *Sorocaba* — S. P. (20-jara — pri ĉt kun gebulgaroj, interŝanĝas pm, monerojn, librojn, revuojn ktp.). Skribu al la sama adreso por la ceteraj membroj de la E-klubo, kiuj ankaŭ deziras havi amikojn en nia lando.

S-ino Sandra da Rocha Monteiro — Rua do Riachuelo, 119 apto. — 416 — centro, 20 000 *Rio de Janeiro* (kun gebulgaroj pri ĉt, interŝanĝas pm, bk)

Flavio Augusto Gomes — Rua Santa Alfredo 589, 90 000 *Portoalegre* — RS (tre interigās pri E-o kaj la futbalo en Bulgario).

Bulgario

Veselka Dimitrova — str. Ivan Nenov 14, ap. 11, 3000 *Vraca* (24-jara oficistino — kun junaj geesp-stoj pri moderna muziko, sporto, bk, kalendaretoj, fotoj de aktoroj).

Maria Georgieva Boneva — str. Karlovska 144 (411), *Plovdiv* (kun ĉl pri moderna muziko)

Lilija P. Konstantinova — str. Asen Hlaĉev 71, 4004 *Plovdiv* (17-jara lernantino — kun ĉl pri muziko, filmoj, bk)

Ivo Albenov Garev — str. Gurko 3-a, 4400 *Pazargik* (18-jara — kun ĉl pri ĉt, aparte pri radio-elektroniko, gram. diskoj — en Esperanto, rusa, angla, germana). Respondo certa.

Nadka Rusanova — str. Skobelevska 35-a, *Loveĉ* (instruistino — kun ĉl)

Jordan Nikolov — 4468 *Momina Klisura* (kun gee-stoj el Budapeŝto, Prago, Bratislavo, Beogrado, Berlino, Dresdeno, Lajpcigo, Varsovio, Katovico, Triesto, Zagrebo, Venecio, Lozano, Parizo, Londono)

Svedio

Ok svedaj gesamideanoj deziras korespondi kun bulgaraj samideanoj, precipe pri la lando kaj popolo de Bulgario. Aĝo kaj sekso sen-signifa. Skribu al Esperantoklubo de Motala, prez. R. Stridell, *Hagstigen* 6. S 599 30 *Bo-rensberg*, Svedio.